



EKO 2021-37 sendita el Budapeŝto la 6-an de septembro

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA


Ekologio kaj EU en Francio

En Francio la "Commission Espéranto Langues" (Komisiono Esperanto - Lingvoj) ĉe la partio EELV "Europe Ecologie Les Verts" (Eŭropo – Ekologio – La verduloj) atentigas la publikon pri la "Konferenco pri la estonteco de Eŭropo". Tiu konferenco, starigita de Eŭropa Unio kaj daŭranta ĝis marto 2022, konsultas la eŭropunian civitanaron pri la plievoluigo de EU. Reta platformo ebligas al la civitanoj proponi kaj diskuti ideojn kaj voĉdoni por ili. Proponoj estas en diversaj kategorioj, interalie pri klimatsanĝiĝo/medio, demokratio kaj valoroj/rajtoj, edukado. Tiu konferenco ofertas nemaltrafendan okazon pezigi ekologiajn valorojn rekte vidalvide al eŭropuniaj instancoj kaj samtempe la eblon stimuli publikan, oficialan kaj civitanan debaton rilate al la avantaĝoj de la uzo de Esperanto en Eŭropa Unio. La franca kaj franc-lingva publiko estas alvokita partopreni tiun civitanan konsulton kaj subteni por-esperantajn proponojn. En siaj informoj la francaj samideanoj ankaŭ atentigas pri la UEA/EEU-kampanjo:

https://uea.org/vikio/Konferenco_pri_la_estonteco_de_Eŭropo

Surbaze de informoj de Marc ANSELMi ("Komisiono Esperanto - lingvoj" ĉe EELV)

SMG: Jen tereno por AVE, nia ekologia Faka Asocio! Abundas ebloj



- Ekologio kaj EU
- Togolando
- Erasmus plus
- Kroatia aktiveco
- Orienta Timoro
- EKO – NUR retroŝte

Kulturo – survojilo al Esperanto en Togolando

Profite la restadon en Togolando de Paula R., studentino en la sevilja universitato, Hispanio, kadre de Afrika Reto de Kolektiva Agado por la Lingva kaj Kultura Identecoj (ARKALKI), ni aranĝis dekon da interagaj aktivaĵoj, inkluzive prezenton de Esperanto kaj mallongajn lingvajn kursetojn, pri kultura, lingva dignecoj kaj rajtegaleco inter viroj kaj virinoj kun dua-, triagrada lernejoj kaj ankaŭ kun personoj kun universitata edukiteco en la finiĝantaj julio kaj aŭgusto 2021.

Ĉio ĉi povis okazi danke al informmaterialoj kaj esperantaĵoj ricevataj antaŭe de Esperanto-France, subteno de la universitato de Seviljo pere de prof. Vicente Manzano-Arrondo, de UEA kaj kompreneble ankaŭ de lokaj fortoj. Al ĉiuj ni diras tie ĉi dankegon!

Menciindas, ke unu el tiuj interagaj aktivaĵoj eĉ koincidis kun la Esperanto-Tago la 26-a de julio. Do ni uzis la okazon por kunmanĝi ne nur inter esperantistoj, sed ankaŭ kun ne-esperantistoj en amika etoso.

La lasta interaga kunveno okazis sabate la 28-an de aŭgusto 2021. Ĝi kunigis plenkreskulojn de diversaj kulturaj horizontoj, kiuj kapablas teni debaton en lokaj lingvoj pri kultura kaj lingva problemoj. Triono de tiuj personoj estas ne-esperantistoj, sed lingvo-instruistoj en dua- kaj triagrada lernejoj. La plimulto de ili jam komencis lerneti Esperanton.

Adjévi Adjé



Erasmus pri reta eduka en Kroatio

En aŭgusto 2021 en Ďurĉevc, en ĉasista domo, okazis la unua ĉeesta kunveno de partneraj organizaĵoj kiuj partoprenis en la projekto Erasmus + „Reta edukado nun”. Ni jam antaŭraportis pri tio en EKO 34. Jen pliaj informoj. Partoprenis dudeko da personoj el Britio, Francio, Germanio, Hispanio, Nederlando, Hungario, Italio kaj Kroatio. Kunordiganto de la projekto estis *Bialystockie Towarzystwo Esperantistow* el Bialistoko, Pollando, partneraj organizaĵoj estis Bunta Esperanto Asocio el Bolonjo, Italio, Kosmo Strategio el Edinburgo, Britio, Centre Culturel Esperanto el Tuluzo, Francio, kaj Dokumenta Esperanto Centro el *Ďurĉevac*, Kroatio. Malgraŭ ke la projekto komenciĝis en Decembro 2020 kaj daŭros ĝis la fino de Majo 2022, ĝis nun oni okazigis, pro pandemio, nur retajn kunvenojn, partneroj kunvenis unuan fojon en *Ďurĉevac*. La programo konsistis el prelegoj pri arkivoj, arkivado kaj ciferecigo de

arkivaj materialoj, preparado de retaj libroj kaj broŝuroj. Per amika diskutado pri temo de la projekto kaj preparado de sekvonta kunveno en Bialistoko, Pollando en Decembro 2021 finiĝis la kunveno.

La Kroata Asocio, KEL, daŭre aktivas. Jen la kovrilo de ilia lastatempa revuo.

Orienta Timoro

EKO ricevis nudan retligon sen pliaj informoj. EKO malsukcesis trovi tion en Facebook, kiu inundas nin per ĉio ajn.

Oni supozus, ke preciza adreso gvidus rekte al la ero. Vane. Do, via respondeco, se vi scias trovi ĝin.



<https://www.facebook.com/photo.php?fbid=114371037621620&set=np.1630399538375179.1373695543&type=3>

Ni ege volonte ricevos informojn pri Orienta Timoro, sed bv. sendi ilin al mi NUR kaj EKSKLUZIVE per serioza retpoŝto, prefere kun teksto de ĉ. 300-400 vortoj kaj komunikiva foto aŭ fotoj. Sufiĉas ekran-kvalito.

Kontaktado de SMG – averta atentigo

SMG komunikas re-refoje al vi ĉiuj, ke mia retaliro estas ekskluzive pere de mia retadreso ĉe <gmail.com>. Ne provu mesaĝi al mi aŭ peti amikiĝon per Facebook, LinkedIn, Instagram kaj similaj, mi forigas aŭtomate ĉiujn tiujn mesaĝojn kaj petojn. Nek mi atentigas Twitter, Twee, Twoo, Twat, Twot, Twizel, Twing, Twong, Trello, Trillo, Twiddle, Twadle, Tweedeldee, nek Tweedeldum kaj similaj parazitaj, eĉ danĝeraj komunikiloj.. Mia tasko en mia restanta vivo estas atingi konkretajn rezultojn, kaj ensklavigo al tiuj superfluaĵoj malhelpas tion kaj alportas nenion pozitivan.

EKO dankas al la provizora teamo de korektantoj/redaktoroj: Gbeglo Koffi (Togolando), Rob Moerbeek (Nederlando) kaj François Lo Jacomo (Francio).

Alkroĉaĵo: Enkonduka prezento por EKO 77 en Vroclavo, sept. 11, 2021.

===== vortoj: 690 =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-akado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de majo 2021 (per EKO 2021-22). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro deposed 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.